




VII<sup>a</sup> KONGRESO  
DE KATALUNA  
ESPERANTISTA  
FEDERACIO

I<sup>a</sup> KONGRESO  
DE HISPANA  
ESPERANTISTA  
KONFEDERACIO

REUS, 11, 12, 13  
DE JUNIO 1916

Reus estas, pro sia industrio, komerco kaj agrikulturo, grava urbo kun ĉirkaŭ 30 mil loĝantoj, sidanta meze de fruktozona bela kamparo apud la bordo de l' Meza Maro. La bildo prezentas la faman preĝejan turon, de kies supro estas ĝuebla belega panoramo. La kongresanoj povos supreniri ĝin, kaj persone ricevi la satindan impreson



Ĉe la Urbodomo, kiun la bildo montras,  
la aŭtoritatuloj akceptos la kongresanojn



La Vinkultura Instituto, apude montrata, plenumas la nepran taskon postulatan de regiono, el kies ĉefaj riĉaĵojunu estas la vino. La konstruaĵo entenas laboratoriojn specialajn, eksperimentan kampon, k. c. helpantajn la studadon de l'perfektigoj uzindaj ĉe la vinberkulturo. Vizitebla de la kongresanoj

Domo Navás, kiun la apuda bildo montras, estas specimeno de la belaj modernaj konstruaĵoj, kiuj en rimaŝkinda nombro heligas la nunjaran kongresurbon



La granda placo Prim estas la centro de l'urbo. La monumento, staranta meze, honoras la gloran reusanon generalon Prim, kies faroj estas tiel populare konitaj





Jen bildo de centra pavilono de la fama sanatorio por frenezuloj «Instituto Pedro Mata», eble la plejkompleta kaj perfekta el hispanaj tiaj institucioj. Ĝia travizitado estas vere interesa

Promenejo Mata, la plej bela el la ĉirkaŭurbaj areoj



## Niaj nunjaraj Kongresoj

VII<sup>a</sup> Kongreso de Kataluna Esperantista Federacio  
I<sup>a</sup> Kongreso de Hispana Esperantista Konfederacio

Reus : 11, 12, 13 Junio 1916

**D**u vortoj nur : la sola premio, kiun la Organiza Komitato ricevos por la peza tasko de ĝi plenumita per longe daŭra laborado, estos la danko de ĉiuj esperantistoj. Ni klopodu proprapersone esprimi ĝin: alle ĝi estus, por la okazo, senvalora. Kiu kuraĝus montri sin sendanka al bonaj amikoj, kiuj akceptis en pasinta Oktobro la laboron organizi dum nur sep monatoj solenen, kiu antaŭanoncas sin tre grava? Ni iru, do, amase, grandare, al la Kongresoj; ni refreŝigu nian kuraĝon; ni montru nian veran forton. Ni plenumu nian devon!

## OFICIALA PROGRAMO

### DIMANĈO, 11<sup>a</sup>

- 11'30 Akcepto de la kongresanoj ĉe la Urbodomo.
- 12<sup>a</sup> Solena malfermo de ambaŭ Kongresoj ĉe societo «Olimpo». Salutado de la delegitoj.
- 15'30 Solena malfermo de la Propaganda Ekspozicio en la festosalono de «Centre de Lecturas».
- 16'30 Festo de la Internaciaj Floraj Ludoj ĉe teatro «Circus».
- 20<sup>a</sup> Oficiala festeno.
- 22<sup>a</sup> Kunsidoj de *Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj* ĉe la Katolika Societo; de *Tarragon-Provinca Esperanta Ligo* ĉe la Literatura Fako de «Centre de Lecturas»; de Konservantaro de Floraj Ludoj.

### LUNDO, 12<sup>a</sup>

- 9<sup>a</sup> Diservo solena kun esperanta prediko, en paroĥa preĝejo Sankta Petro.
- 10<sup>a</sup> Labora kunsido de *Kataluna Esperantista Federacio* ĉe la teatro en «Centre de Lecturas».
- 11'30 En sama kunsidejo, labora kunsido de *Hispana Esperantista Konfederacio*.
- 15<sup>a</sup> Ferma solena kunsido de ambaŭ Kongresoj, ĉe la Oficiala Komerca Ĉambro.
- 18<sup>a</sup> Vizito ĉe la Vinkultura Instituto.

MARDO, 13<sup>a</sup>

Ekskursoj : la kongresanoj siaplaĉe povos fari unu aŭ la alian el la jenaj:

Al Poblet. Forveturo de Reus je la 8'22 (Norda stacidomo) ĝis Esplugas de Francolí.

Al sonorilturo de Reus, Instituto Pedro Mata, kaj kluzo de Riudecanyes. Je la 8'30 supreniro al la pinto de l'preĝeja turo. Poste, travizitado de la Frenezulejo P. Mata. Je la 13'17 forveturo al Riudecanyes (stacidomo de M. Z. A.), vizito ĉe la kluzo, kies baseno entenas 35 milionojn da litroj de akvo. Poste, 4-kilometra piediro kaj vizito de antikva monaĥejo en Escornalbou. Reveturo al Reus je la 20'55.

#### Tagordo de la labora kunsido de K. E. F.

1, Sekretaria raporto. — 2, Aprobo de la bilanco de 1915. — 3, Financa stato nuntempa. — 4, Petoj kaj proponoj. — 5, Elekto de kongresurbo por la VIII<sup>a</sup> Kongreso. — 6, Elekto de Direkta Komitato.

#### Tagordo de la labora kunsido de H. E. K.

1, Raporto pri starigo de la Konfederacio. — 2, Diskuto kaj verkado de regularo. — 3, Elekto de Supera Direkta Komitato. — 4, Elekto de Kongresurbo por la II<sup>a</sup> Kongreso.

#### HORTABELO DE VAGONAROJ

inter Reus kaj Barcelona

Forveturo de Barcelona	} 5'26 - 8'33* - 9'20 - 13'00 - 15'23 - 19'49
Alveturo al Reus	} 9'23 - 10'36 - 12'47 - 16'15 - 19'24 - 23'53
Forveturo de Reus	} 5'03 - 5'03 - 7'23* - 8'49 - 14'13 - 17'16 - 17'26 - 21'25*
Alveturo al Barcelona	} 9'38 - 8'48 - 9'23 - 13'27 - 17'42 - 21'44 - 20'37 - 23'28

Vagonaroj signitaj per \* estas ekspresoj

Kun tiuj ĉi suplementoj estas dissendata la rabatilo por la fervoj-vojaĝo. Ĝi taŭgas por ir-revena vojaĝo inter Reus kaj ĉiuj stacidomoj en Hispanujo laŭ interkonsento de la fervojaj kompanioj. Ni konsilas al ĉiuj, tralegi atente la sciigojn presitajn sur la rabatilo.

La insigno de kongresano estos disdonata al la esperantisto antaŭ la oficiala akcepto ĉe la Urbodomo.

La karto por la oficiala festeno koston 6 pesetojn. Estas tre konvene, por la sukceso kaj bona aranĝo de la festeno, ke oni *luj sciigu la O. K.* pri sia partopreno.

## VI<sup>a</sup> Internaciaj Floraj Ludoj

Ekster la tempolimo estis ricevataj la jenaj verkoj, kun devizo:

Numero 59, Febro. — 60, Ĉiuj popoloj amu unu la alian. — 61, Fremda.

### VERDIKTO

#### ORDINARAJ TEMOJ

##### ORIGINALAJ TEKSTOJ

- I. — *Versaĵo pri amo*. — La premio estas aljuĝata al la verko n.<sup>o</sup> 57, kun devizo «La mar' estas poeto de la kreitar'!». — *Citinda*, la verko n.<sup>o</sup> 2, devizita «Mar' brava, mar' verda, maro ŝaŭmadanta».
- II. — *Prozaĵo pri amo*. — Premio al la verko n.<sup>o</sup> 53, devizo «Un beau visage est le plus beau de tous les spectacles» (La Bruyère).

##### TRADUKITAJ TEKSTOJ

- I. — *Traduko de «El Pi de Formentor»*. — La premion oni aljuĝas al la verko n.<sup>o</sup> 10, kun devizo «Sonoru tutmonda la liro, laŭ son' de nacia inspiro».
- II. — *Traduko de «La Ciutats»*. — Estas aljuĝata la premio al la verko n.<sup>o</sup> 3 kun devizo «Sopiro». — *Unua subpremio*, al la verko n.<sup>o</sup> 43, devizo «Amrakonto». — *Citinda I*. Verko n.<sup>o</sup> 39, devizo «Ne estas brilanto ĉio brilanta». — *Citinda II*. Verko n.<sup>o</sup> 17, devizita «Paco, Amo kaj Esperanto».

Oni aljuĝas la NATURAN FLORON kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo, al la aŭtoro de la verko n.<sup>o</sup> 57, kun devizo «La mar' estas poeto de la kreitar'!»

#### EKSTERORDINARAJ TEMOJ

- I. — *Premio de Lia Arĥiepiskopa Moŝto S-ro Antolin López Peláez*. — Al la verko n.<sup>o</sup> 35, «Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon». — *Mencio*, Al la verko n.<sup>o</sup> 34, «Euntes in mundum universum».
- II. — *Premio de Lia Moŝto S-ro Antón de Veciana*. — Al la verko n.<sup>o</sup> 49, «Vekiĝu homaro».
- III. — *Premio de Lia Moŝto S-ro Antón Estivill i de Llorach*. — Ne konkursita.
- IV. — *Premio de «Centre de Lecturas» de Reus*. — Al la verko n.<sup>o</sup> 45, «Mal-longaj pensoj».
- V. — *Premio de S-ro J. Martorell Odena*. — Al la verko n.<sup>o</sup> 32, «Tri haringo». — *Subpremio* al la verko n.<sup>o</sup> 8, «Rana Esculentas».
- VI. — *Premio de Literatura Fako de «Centre de Lecturas» de Reus*. — Al la verko n.<sup>o</sup> 55, «Charitass».
- VII. — *Premio de Urbkonsilantaro de Reus*. — Al la verko n.<sup>o</sup> 16, «Triopa kordo». — *Subpremio* al la verko ricevita post la datolimo n.<sup>o</sup> 61, «Fremda».
- VIII. — *Premio de Iliaj Moŝtoj, S-roj Ramón Vidiella, Antón Borrell kaj Miquel Alimbau*. Ne aljuĝita.

- IX. — *Premio de Provinca Deputitaro de Tarragona*. — Al la verko n.º 54, «Oh temps passats de dolç recorte».
- X. — *Premio de «Gerona Esp-ros»*. — Al la verko n.º 33, «Rugobuŝa knabineto kun la dolca klar-ŝul». — *Unua subpremio* al la verko n.º 56, «Veni, vidi, vici». — *Dua subpremio* al la verko n.º 18, «Al paro da belaj okuloj».
- XI. — *Premio de Milita Komandantejo de Reus-Distrikto*. — Al la verko n.º 24, «Por patrujo kaj Esperantujo».
- XII. — *Premio de Lia Ekscelenco Moŝto, S-ro Enric Prat de la Riba*, prezidanto de «Mankomuneco de Katalunujo». — Al la verko n.º 30, «A Lesbia rediviva...». — *Subpremio* al la n.º 59, «Febro».
- XIII. — *Premio de Konstitucia Urbeŝtraro de Tarragona*. — Al la verko n.º 19, «Nové Mac». — *Subpremio* al la verko n.º 15, «Kiel la Mastro tiel la servisto».
- XIV. — *Premio de Esperanta Tarragon-Provinca Ligo*. — Al la verko n.º 6, «Colonia Victrix».
- XV. — *Premio de Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj*. — Al la verko n.º 35, «Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon».
- XVI. — *Premio de Kataluna Grupo Esperantista de Paris*. — Ne konkursita.
- 31 Majo 1916. — Vicente INGLADA ORS, prezidanto; Fidoj Eulalia ROSKELL, Teresa ROSKELL; S-roj D-ro Josép M.ª TERRACERAS, José PEROGORDO; Josép VENTURA, sekretario.

## LASTMOMENTAJ SCIIGOJ

La Natura Floro estas aljnigita al la bona esperantisto kaj facila poeto S-ro Artur Doménech. Mas, el Barcelona, kiu jam la duan fojon atingas la plej honoran premion en la Floraj Ludoj.

Li elektis Reĝino de la ĉarma Festo fraŭlinon Lola Alimbau i Codina, el Reus, kiun ĉirkaŭos en kortego ŝiaj amikinoj el la plej distingindaj familioj de la kongresurbo.

Ni gratulas kore la laŭreston kaj salutas respektive kaj serveme ŝian Reĝinan Moŝton.

— Lia Ekscelenca Moŝto la Ministro de Publika Instruado per letero de 29 de Majo sciigas la prezidanton de la O. K., S-ron E. Aguadè, ke li delegis sian reprezenton en la personon de lia ekscelenco la Rektoro de la Universitato de Barcelona, S-ro Valenti Carulla.

La eksterordinara ilustrita numero de KATALUNA ESPERANTISTO kun la raporto pri la Kongresoj, APEROS NUR KIAM EBLE, ĉar la ordigo de la granda kvanto da materialo, pretigo de ilustraĵoj kaj publikigo de la tuto postulus sufiĉe da tempo. Tamen, oni ne malpaciencaj La Redakcio klopodos aperigi ĝin

*laŭ eble plej baldaŭ*